

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA GAZĖTO □ OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO
SEN PAGA POR LA GEFEDERACIANOJ

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO
12. strato Gracia. — SABADELL
BARCELONA-HISPANUJO

AVIZO: La Redakcio konservas al si la rajton korekti laŭ bezone la manuskriptojn. Neakceptitajn manuskriptojn oni ne resendas.

ENHAVO: Venu, Venu!. — Ĉiuj kunvenu! — Flugadoj. — Kial ne verki pli originale?. — Neĝa mateno. — Enketo. — La du Vintroj. — Enlanda Movado. — Oficiala parto.

VENU, VENU!

La esperantsonoriloj vokas al festo! Ĉu vi aŭdas?
«Venu, venu, geesperantistoj, ĉar estas festo!»

Kiel la kristanoj ni starigu nian naskan feston, la festo de la naskiĝo de nia K. E. F., kaj, ĉar ni fervoraj ĝojas pro la naskiĝo, ni devas ĝin festi.

«Venu, venu, ĉar la sonoriloj vokas al festo!»

En la tuta lando la vokoj aŭdiĝos! Ĉiuj pretiĝu, gefratoj; ĉiuj alestu, geamikoj! Ĉiuj venu honori vian lokon kaj venu ĉiuj varmigi en entuziasmo! Du tagojn vi delasu la hejman amon, kaj venu droni en la amo batiganta la koron por la gefratoj tial, ke la gefratoj kunvenos, ĉar la sonoriloj vokas al festo.

«Venu, venu!»

En ŝajna metamorfozo, la naturo eĉ nin festos pro nia naskiĝo; ĝin vidu: ĝi verde sin vestis, ĝi kovris sin per nia koloro, per nia simbolo — la espero! Vi venu! Nia okaza hejmo estos urbo industria, estos Sabadell'o, kiu, en tiuj tagoj la maŝinaj feraĵoj mutiĝos por ke ĉiuj alestu al la festo de l'espero, kaj por aŭdigi nian kanton, ĉar okazos nia festo!

«Venu, venu, samlingvanoj!»

Ĉiuj ĉirkaŭ la tablo por kontentigo de la koro, ni staru! Tie ni kunfratiĝos, ni ĝojos kaj ridos; dum ni ĉirkaŭprenos la geamikojn kaj manpremos la nekonatojn ni bedaŭros pri la nealestantoj. Vi venu! Nia kunveno estos toasto al ĝojo, al amo, al espero, al fido; ĝi estos la festo de la vivo kaj de la poezio; ĝi estos la festo de la idealo, de Esperanto; ĝi estos la festo de la katalunaj geesperantistoj!

«Venu, venu!» — vokas la sonoriloj.

Venu ĉiuj, gefederacianoj; ĉeestu ĉiuj geesperantistoj! En nia festo neni devas manki, ĉar la ĝojo kaj sukceso des pli grandaj estos, ju pli multenombre vi venos. Venu ĉiuj, neni manku, ĉar la sonoriloj vokas al festo!

Dum nia kunveno ni fortikiĝos! Per ĝi ni pretiĝos por estontaj bataloj, por baldaŭaj konkeroj. La diligentuloj, la spertuloj, la kleruloj, iniciatos la ceterajn; kaj ĉiuj en festo, Esperanton festos!

«Venu al la festo!»

En la stratoj de la urbo, ni svamos; ĝi ŝajnos perforta ekokupo de la esperantista gento, ĉie amsemanta, ĉie bonfaranta!...

Kaj en la festofiniĝo, en la dissiĝo, ni kvazaŭ riverdefluiĝo superakiriĝos la landon, pretaj por la venko, pretaj por triumfi, kun stimulo por laboro, la koro batanta, la kapo serena; alsopirante la feston, sopirante pri la gefratojn, sopirante pri nova festo!

«Venu, venu! ĉar vokas al festo la sonoriloj», kaj, se vi ne ĉeestas ili morgaŭ ne vokos, morgaŭ mutiĝos, morgaŭ silentos! Morgaŭ estos la paco kaj la kvieto. «Venu, venu!»



ĈIUJ KUNVENU!

NEPRE ni bezonas kunveni, samlandanoj! Estas la kunveno necesa. Mankas al ni reciprokan koniĝadon, por esprimi unu al aliaj dezirojn, sentojn, fervorojn, entuziasmojn, entreprenojn, agemecon! La fervoro, espero kaj fido de ni aparte sentita bezonas kuniĝon por ke ili flamiĝante ardigu ĉiujn korojn!

La K. E. F., granda rondo de gesamideanoj, devas pridiskuti ĉiujn aferojn rilatantajn al la movado en nia lando. Kaj estas ĉies devo partopreni, pridiskuti kaj kunhelpi la organizadon kaj triumfon de tia movado. Ni devas rimarki ke, la entreprenoj ne fariĝas grandaj per la sola forto de unu homo, sed de multaj; ke la trium-

fon atingos ne unika sola homo, kvankam li estu heroo, sed multaj herooj, multaj homoj, multaj entreprenantuloj, ĉar nia movado ne estas aro da militistoj sed aro da batalantoj por ideo. Ni devas atenti ke nia movado ju pli granda estos, des pli multaj homoj ĝin deziras kaj klopodos grandigi, ĉar ĝi ne konsistas el unu homo sola, sed el ĉiuj samideanoj, tial ke la K. E. F. ne estas unu samideano, sed arego da samideanoj. Rimarku ke la triumfo de nia ideo ĉe ni, ne nur konsistas el la alvarbado de novaj kaj multaj samlandanoj, sed ankaŭ de nia bona direktado kaj organizado. Ni do, partoprenu ĉiuj senescepto en la elekto de nia konsilantaro; ni do, ĉeestu—ĉiuj sen escepto—en la 1.^a Kongreso de Katalunaj geesperantistoj. Ni elektu por nia Komitato klerajn kaj agememajn homojn, malgraŭ ili ne estu famaj; ni elektu kiel direktantojn niajn, kuraĝajn batalantojn.

Ni discipline plenumu nian devon, kaj ni agu kiel popolamasoj kiam aŭdas la voĉon de la estro: obei. Ni aŭskultu la voĉon de nia estro—la Idealo—kaj ni obeu ankaŭ. Ni ne atentu la bruajn kriojn de la ne amikoj: ni ne ŝanceliĝu; ni memoru pri nia devo kiel esperantistoj kaj ĝi nin rajte plenumu. For de ni la duboj!

De la kvar flankoj en nia lando vi venu partopreni en la 1.^a Kongreso de Katalunaj geesperantistoj. La kvinpinta verda stelo montras la aldirekton al ni: ĝin sekvu; ni marŝu post ĝi: ĉar resti hejme kaj forgesi la devon plenumontan ne decas la kuraĝa batalanto.

La koroj supren, gesamideanoj! Ni imitu la ekzemplon de la Naturo en la estanta tempo: ni floru: ni ekmontru promeson de plejriĉa fruktado. Kiel la tero, kiel la arboj, kiel ĉiuj plantaĵoj, ni fruktu: ĉar ni ankaŭ en ni havas grandan forton: sed estas nia devo elmontri, kaj elpruvi tion; kial? Ĉiuj kunvenante en Sabadell, ĉiuj alestante al la 1.^a Kongreso de Katalunaj geesperantistoj.



FLUGADOJ

II

OFTE, eligante de mi mem, mia revo ĉie disvolvas kiel mal-kvieta spiritulo serĉante... mi ne scias kion; mi serĉas: eble *la homon*; ankaŭ eble *la feliĉon*; kaj mirindaĵo! eble iafoje mi min serĉas en la spaco, inter la estelaro...

Hodiaŭ mi forflugas *suben* serĉante entuziasmon, fortegon, virecon, junan sangon, abnegacion, akran sonon de bataloj.

Hodiaŭ forflugante tra la kataluna lando, mi ankora ŝripetas la toaston de la unua flugado: «Ni toastu amon, gekunfederanoj, per glaso da feliĉo, la esperantan sukceson... tra la sankta amikeco... ĝis mirinda disciplino»...

Mastro de la tempo, kvazaŭ dia fantomo, mi ordonas la anamasojn, kiuj rondirantaj, kiel fervorega Walkiraro, la cignon kiun rajdas Zamenhof'o-nia Lohengrin'o forta batalanto pro Homareco. Li elvenas de Monsalvat'o, *la dolorplena vivado*, sed kie estas Templo de Sankta Graal'o, *la amego*, donante nevenkeblan virecon. De Parsifal'o, mastro de Monsalvat'o, bona filo, kaj prefera filo de amo, Lohengrin'o rajdas tra la tempoj fratigante la homojn ĉiujn, triumfante malgraŭ perfidatado de Frederiko... Mi lin vidas, brilantan, helegan, kiel disverŝas benojn al la grandeguletoj malanoj.

De liaj okuloj eliras rigardojn de ruĝa fajro, kontraŭ la kora kaj pensa frostoj... Per siaj manoj li dorlotas kaj kombas la frizitan dikharon de la Homaro, dum la kolombino de la Sankta Graal'o kantas: «frateco! amo!»

Verda stelnokto resendadas en lian vizaĝon esperantan ĉielarkon... altege, la blua aero rebrilas la imagon de *la homo*, kiun mi serĉas en la hodiaŭa flugado.

F. SURROCA

Transcendemuloj...? 3. 9.



KIAL NE VERKI PLI ORIGINALE?

La esperanta nacio de antaŭ ne multaj jaroj mirinde vastigas siajn limojn kaj kun ili eksterigas siajn animajn energiojn, montritaj ĉu en sennombro de specialistaj societoj, ĉu en sia potenca gazetaro, ĉu fine en sia diversa, multhava kaj alloga Literaturo.

Interesaj sendube estas por la evolucio kaj disvastigo de nia benita lingvo la unua kaj dua de tiuj elementoj; sed multe pli interesa, pli radikiga, pli konvinka, pli memstara kaj daŭra estas la lasta el la cititaj faktoroj.

Efektive: rilate la direktorojn kaj organizantojn de rimedoj por

intensiva propagando, tre penetritan elmontras enhavi la ideon de esperantismo: tamen, la homa naturo estas malforta kaj post ripetitaj baroj ofte cedas la individuo, kaj eĉ pro unu persono falas iam anaro respektinda. Oni ne povas same paroli pri literaturaj verkoj: do, unue, la publikigoj estas ordinare destinataj longedaŭri: iliaj legantoj, kiel tiuj de kiu ajn naciĉero, posedas laŭdedukte la lingvon: la legado, dum ke ĝi estu iom agrabla aŭ instrua, postlasas en la spirito profundajn impresojn, persistajn rememorojn, superajn sentojn; kaj la verko pasas de unu al alia, kiel taŭga ilo al unuj por perfektigi, kiel ligilo de kunpenetro kaj solidareco al aliaj, ankaŭ kiel ĉiama propaganda instrumento al la indiferentuloj, inter kiuj ĝi realigas grandepovan kaj progreseman selekton por niaj jam dikaj vicoj.

La esperanta Literaturo entreprenis eksterordinaran flugon tra ĉiuj literaturaj klasoj kaj konataj regionoj. La stilistoj esperantaj okupas honoran seĝejon enviditan de multe de naciaj verkistoj. Ilia famo etendiĝis tra la tuta homaro: ilia nomo estas riverencita de miloj kaj miloj de admirantoj: iliaj skribaĵoj estas legataj kun duobla, eĉ triobla ĝuo ol la mempatrujaj. Kiu ne sian ĉapon respektete demetos antaŭ la distingindaj nomoj de: la Majstro, Kabe, Grabowski, Vallienne, Lojko, Kofman, Boirac, Cart, Noel, Lengyel, Bourlet, Chavet, Dufentrel, Deshays, Meyer, Parisot, Giambene, Inglada, Loira, Pujulà, Sabadell kaj cent aliaj de sama aŭ plia merito? Dank' al ĉi tiuj grandmeritaj verkistoj ni povas ĉiuhore ĝui la literaturajn perlojn, en ĉiuj epokoj de la historio de la homa genio ĉien trapasinta, dissemiatajn: dank' al ili, ĉiu literaturo akiras novan senmortecon, ĉar estas tradukita en internacia idioma kaj trakuras konsekvence la kvar mondajn partojn: dank' al ili, ĉiu malgranda patrujo estas nobligita kaj ĝentile akceptata de la ceteraj en la grandan socian kampon, reciproke penante dorloti unu la alian, kunhelpante treege al la intersia respekto, kiu baldaŭ fariĝas simpatio kaj finas iĝante feliĉa ligilo de amo inter ĉiuj popoloj de la tero; ligilo kiu ilin pli forte kaj fruktodone kunligas ol ĉiuj feraj katenoj kune kun ĉiuspecaj militiloj de la homo en sia frenezo elpensitaj.

Malgraŭ nia jam riĉa literaturo oni de tre longe en ĝi rimarkis grandan malplenon, des pli malfacile plenegeblan ju pli malfrue oni ĝin ekelizos. Mi rilatiĝas al nia preskaŭ nula *originala* literaturo. Ĉu mankas en nia kampo kreantaj genioj? Ĉu ne pruvis multaj el niaj verkistoj per broŝuroj kaj gazetoj posedi brulantan inspiron por produkti majstrajn verkojn?

Ĉu eble ili suspektas ke siaj produktaĵoj ne havos favoran akcepton kian povas atingi la tradukoj de la famaj genioj? Pri tiu ĉi punkto oni devas rimarkigi: ke la ĉefaj verkoj estas legeblaj en ĉiu preskaŭ idiomo: ke estas rigardataj kun prefera simpatio de la legantaro kaj esperantista gazetaro, la verkoj originale esperantaj: ke, post nelonge, oni postulos ĉe niaj ekzamenoj kaj esperantaj konkursoj profundan scion pri ĉi tiuj produktaĵoj, pli ol pri kiu ajn; kaj laste, ke iliaj nomoj enkapigos niajn katalogojn kaj brilos kiel unuagradaj steloj en la ĉielo de la esperanta literaturo.

Pli ankoraŭ: kio plej klare elmontras la *apogeon* kaj riĉecon de iu lingvo estas precize ĝia originala literaturo: ĉi tiu reflektas kvazaŭ sur fidela spegulo la karakteron, la energiojn de iu tuta popolo: ĉi tiu prezentas antaŭ la okuloj eksterlandaj la vivantan historion de iu raso: ĉi tiu, kiu, ludante Tirtean rolon, bruligas la koron kaj imagon de la amasoj por daŭrigi glorajn almlitojn: ĉi tiu, kiu kantas niajn heroojn, festas agojn memorindajn, kaj senmortigas nian lingvon kaj nian popolon. Ĉu do ni restos indiferentaj antaŭ tiel rimarkindaj rezultatoj kaj dorlotemaj kvalitoj kiaj ornamas la originalan literaturon? Ĉu ne uzos siajn mirindajn talentojn la gravaj esperantaj literaturistoj por nin riĉigi per siaj geniaj kreaĵoj, ĉe kaj for de nia gazetaro, enpuŝante tre alten nian benatan lingvon? Se tiel estos, realiĝos en la esperanta raso la diro milfoje ĉe nia lando kopiita: «la popolo kiu sian lingvon honoras, sin memhonoras»; kaj Esperantujo kun la dankema homaro kronos iliajn fruntojn per laŭro de la senmorteco.

s. PUBILL, sk.



NEĜA MATENO

Edzinet' la mia
alproksimiĝu min,
mia ama koro
varme vokas vin.
Alproksimiĝu varme,
ekstere estas la neĝ';
ni tuj vekiĝu ĉarme,
al am' ni kantu preĝ'.
En mia varma hejmo

ne sangos la veter',
en ĝi per nia amo
ĉeestados la somer'.
Aminda edzino mia,
de mia anim' la lum',
de miaj revoj celo,
de mia kor' parfum'.
Se min de l' ĉielo falas
neĝo ŝanceliĝanta,

ni gloru nian amon
 per kanto varmiganta.
 Falu, neĝeroj, falu,
 ĉion malvarmigantaj,
 sed ne niajn korojn
 pro la varmeg' batantaj.
 Se ekstere neĝo falas,
 kaj ĉio blankigata,
 himno al Sankta Amo
 interne estas kantata.

Post, dum la Somero,

la floroj elirantaj,
 ĝojigos niajn korojn
 per flaroj odorantaj.
 Patrino Naturo zorgos
 kreskantan floron sian;
 kaj ni kiel Naturo,
 amzorgos la flor' nian.
 Alloge ni rigardos
 kiel la flor' beliĝos
 kaj patra nia amo
 jam tiam plej satiĝos.

KROM

Transcendemulo?—4-9

Vich 19^a Marto 1910.



ENKESTO

SE kion mi nun Esperante diros, ĝin dirus alilingve, tre kontraŭesperantiste mi agus; kvankam ĉi-tiu afero, parte, estas tute negrava, kaj ne nur enesperanta sed ankaŭ ennaturlingva: ĝi estas speciala gramatikaĵon ni povas ĝin elprezenti per la jenaj vortoj: «diferenco (gramatika) inter la artikolo kaj la adjektivo».

Kio estas artikolo? Kio estas adjektivo? La definojn pri ĉi-tiuj du gramatikpartoj mi ne memoras esti iam vidinta en Esperanto. Tial mi preparolos, laŭ la ĝeneralaj definoj ennaturlingvaj. Tiel oni povas konkludi la definojn, pri artikolo, per, ĝi estas gramatikparto kiu *montras* la substantivon; kaj tiujn pri la adjektivo, per, ĝi estas gramatikparto kiu *kvalitas* la substantivon.

Nu! Ĉu la artikolo ne kvalitas la substantivon? Ĉu la adjektivo ne montras ĝin? Ekzemple: *la* homo kiu estas tie; *tiu* homo kiu estas tie. Ĉu estas ia gramatika diferenco inter *tiu* (adjektivo) kaj *la* (artikolo)?

Nun neniu diru — ĝi estus infana — ke se oni komparas alian adjektivon, ekzemple *tia* mem, oni vidas la diferencon; ĉar tiel oni konkludos ke *tiu* ne estas adjektivo sed artikolo.

Alie, en Esperanto okazas — kaj por tio ĉi posta mi diris la ĉion antaŭan — ke la artikolo ne estas gramatike same konsiderata kiel la adjektivo (postetempe mi preparolos pri la adjektivo *ies*): ĉi tiu estas deklinaciata kaze kaj nombre; tiu ne. Tamen katalune

ekzemple, kiel kastile, france, itale, k. c., ambaŭ estas konsiderataj gramatike same ambaŭ estas deklinaciaj nombre kaj sekse; angle, cetere, estas medeklinaciaj, sed ambaŭ same; k. t. p..

DELFI DALMAU.

Ĉu iu estos tiom dankinda ke honvolos ion plu diri pri ĉi tiu afero?

Ĉi tia enkesto celas nenion krom instrui.

D. D.

Aprilon de la 1910.^a

En Barcelono — Carrer Carme, 41.



LA DU VINTROJ

Sekaj folioj jam falas
de l'arboj, alvenas vintro,
kaj mi jam sentas malvarmon
interne en la koro mia.
La grizaj venontaj tagoj
revenas kune kun pluvoj.
Alproksimiĝas frostadoj,
neĝoj, glacioj kaj nuboj.
Kiel falas la folioj
velkitaj de la malvarmo,
la mia koro velkiĝas,
la miaj esperoj falas.
Kaj, ankau, kiel la ventoj
dispecetigas foliojn,
disigas la malfeliĉoj
de mia kor' l'iluziojn.

Antaŭe, kiam alvenis
nigra vintro, la malvarmon
mi mokis; kaj sole pensis
ke poste, Printempo gaja
revenos kun sekvantaro
de gajeco, kaj parfumo
de floroj, ludoj, movadoj,
aero, vivo kaj lumo.
Kiom mi ĝojis pensante
pri la noktoj stelplenaj
varmetaj kaj parfumataj
de la belega Printempo!
Sed nun, rememorigante
malgaje, ke ĵus alvenas
de la vintro la regadon,
malvarm' interne, mi sentas.

ANIZERO



ENLANDA MOVADO

BARCELONA

Grava Fako. — Pere de ĉi tiea esperantisto, kaj en la Kongreso de Boulogne — ŝajnas al mi ke ĝi estas — holanda blindulino ekciis pri blindulo de nia urbo, kaj ĉi tiu pri ŝi. Ambaŭ interkonatiĝis korespondade ĝis la V^a Kongreso, kiam ili ĉi tion faris parole.

Konsekvence de ĉi tio, ili geedziĝis la 9^{an} de la ĵus pasinta Aprilo.

Ŝi estas la klera S^{ino} de Chalmot, kaj li nia kara sampatrujano S^{ro}. Zapater. Kiel vi vidas unu estas holandino kaj la alia kataluno, kiu tamen povas dubi ke ili reciproke komprenis unu la alian, kaj tiel bone skribe unue, kiel parole poste?

Okaze de tiu fakto la Barcelona Esperantistaro, festis la novaj geedzoj per festeno kiu okazis la 10^{an} de Aprilo.

Cent dek geesperantistoj el ĉiuj ĉi tieaj grupoj partoprenis en la festeno kiu estis vere memorinda. La entuziasmo reganta en tiu festo, krom la honoro al la dirita fakto, elmontris, unu fojon plu, ke Esperanto definitive kaj ĉiasence sukcesis en Barcelono.

La prezida tablo estis bele ornamita, kaj sur ĝi, perfloure skribita «Vivu Esperanto». Meze sidis la gefestatoj, kaj je ilia dekstra flanko, S^{roj}. A. Sabadell, J. Rosals, kaj D. Dalmau, je la maldekstra S^{roj}. J. Bremón, M. Cases, kaj Balcells.

Post kelkaj minutoj dum kiu oni gaje manĝis, trinkis, kaj interbabiladis, komencis la toastoj. Nome de la festorganizintoj, S^{ro}. Ribera dankis la ĉeestantaro pro ilia partopreno, kaj nomis tiujn kiu devis parolade toasti, samorde kiel mi iliajn nomojn jenskribas: S^{roj}. Lafuente, Casajona, Anglada, Borts, Vermúdez, González, kaj la prezidantaro.

S^{ro}. D. Dalmáu kiu diris ke kiam oni scias pri eksterordinare grandaĵo kia Esperanto, neniam oni estas plene konvinkitaj pri ĝia efikeco, ĝis kiam oni ĝin vidas kiel, ekzemple, en ĉi tiu okazo. Tial li daŭrigis kordezirante ĉiaman feliĉecon al ĵus geedziĝintoj.

S^{ro}. Balcells, nome de la societo «Paco kaj Amo» post toasti, kiel ĉiuj, bone konkludis ke nia lingvo estas fonto de paco kaj amo.

S^{ro}. Rosals, kiu diris ke tiu festo sentigas al li ĝojecon kaj malĝojecon: ĝojecon, li diris, ĉar ĝi estas honoro al tiu honorinda fakto; kaj malĝojecon, ĉar ĝi estas la adiaŭo al tiom simpatiaj gesamideanoj.

S^{ro}. Cases, nome de «Espero Kataluna» kiu legis bonhumoran toaston, kiu aliparte estis kortuŝa.

D^{ro}. Bremón, kiu faris elokventan paroladon, aplikis belan rakonton al nia okazo, dirante ke estis sultano kiu malgraŭ sia grandega riĉeco estis ĉiam malfeliĉa ĉar li estis blinda, sed tamen, de iam kiam li povis havi vidon, kvankam ĝi kostis al li sian tutan materialan riĉecon li estus feliĉa; pli bone okazas hodiaŭ al niaj blinduloj — li diris — danko al la grandega verko de D^{ro}. Zamenhof.

S^{ro}. Sabadell, kiu per elokventa parolado sciigis la devenon de la fakto kiun ni honoris, kaj priparolis ĝian gravecon.

Fine parolis la geedzoj kiuj vere emociplene dankis ĉiujn, finante ĉi tiu simpatia festo kun la himno de nia nova sento, kiun D^{ro}. Bremón bonvolis ludi fortepiane, kaj ĉiuj ĝin kantis.

Ankaŭ okazos je la finiĝo, baletoj kiu ĝojigis la gejunuloj, kiuj multenombre ĉeestis la festenon.

La 18^{an} de Marto pasinta nia klera samideano D^{ro}. Bremón, faris paroladon, pri la temo «Solvo de la problemo de lingvo internacia» ĉe la grava societo «Centre Autonomista de Dependents del Comerç i la Industria».

La konvinkegaj argumentoj pri tiu temo, jam konataj de preskaŭ ĉiu esperantisto, kaj la fameco de D^{ro}. Bremón, senkulpigas nin, pro ne raportilian paroladon, por pruvi la Esperantistigecon de ĝi.

La ideo pri la Barcelona Esperantista Societo kiun mi priskribis en la antaŭa numero, rapide progresas entuziasme de ĉiuj tieaj esperantistoj.

Esperantistaj vendredoj. — La laborema esperantista grupo de «Ateneu Enciclopedic Popular» organizis kiel jam anoncis la ĉi tieaj ĵurnaloj, Esperantistajn vendredojn ĉe si.

Tiaj Esperantistaj vendredoj, konsistas el esperantaj pridiskutadoj kaj paroladoj: nun mi ne devas forgesi diri ke ĉi ties organizintoj gratulinde sukcesis, ĉar sia organizitaĵo estas multe ĉeestigata, malgraŭ la diskutadoj ne tiom sinpartoprenigataj.

La tagon 25^{an} de Februaro, nia honorinda pioniro S^{ro}. Pujulà inaŭguris tiajn vendredojn per esperanta elokventa parolado, pri *Ideologio de Sinibaldo de Mas*.

Post klarigoj pri la personeco de S^{ro}. de Mas, S^{ro}. Pujulà elmontris la fundamentan teorion, kaj ortografiajn — se oni povas diri! — signojn kun aliaj fonetikaj valoroj, de la Ideologio de nia samlandano,

Ni vidis kiel la fundamenta teorio, tre similas nian esperantan, kaj sekve alproksimiĝas al la vero; kaj ni konstatis kiom erare, de Mas post tiu logika kaj klera vido de la solvo falis en la komplikecon de hieroglifa skribado. Ankoraŭ ĉi tie, Sinibaldo de Mas, restas la logika klarividanta elpensinto. Mi povis tie rimarki la uzadon de afiksoj tute kiel en nia Zamenhofa lingvo, la simpligon de la konjugacio, kaj unuvorte, la simplecon relativan de la tuta sistemo. Sed la veran eraron li faris atribuant al ĉia signo arbitran fonetikan valoron, kiuj parolebligas la ideografion sed en maniero sovaĝa.

Cetero S^{ro}. Pujulà, celis pruvi, ke tradicio pri internacia lingvo ne mankas ĉe ni kaj ke krom Aribau, aliaj eminentuloj sin okupis pri la solvo de tia demando, ne nur teorie, sed reale, kaj sekve ni devas konsideri kiel devon la disvastigon de Esperanto, sola solvo de la problemo.

La 4^{an} de Marto, dua esperantista vendredo, okazis esperanta interdis-

kutado. Paroligi esperante, estas la precipa celo de la organizintoj de ĉi tiaj kunvenoj.

La temo pridiskutata estis «La Esperantismo en Barcelono», partopreninte en la diskutado S^{no}. G. Rebours de Pujulà, kaj S^{roj}. Pujulà, Bremón, González, kaj Bacardit, memorante la historion de nia movado en Barcelono.

La 11^{an} de Marto, okazis parolado de nia klera samideano, D^{ro}. Bremón. kies temo estis ankaŭ «La Esperantismo en la Kataluna ĉefurbo». Li elmontris la vojon ĝis nun trairita de la Barcelona esperantistaro, kaj elokvente li elprezentis al ĉirkau kvar cent ĉeestantoj nian kvietecon kaj semagadon por Esperanto, konsekvenco de tro individualista karaktero kaj manko da organizacia unuiĝo, kies solvo — li diris — estas nia «Kataluna Esperantista Federacio».

La 18^{an} de Marto okazis diskutado, kies temo estis «Propono de temoj».

Tre interesa estis tia diskutado. Unue oni konkludis ke estas konvinda ne miksi politikon kaj religion en kunvenoj, sed baldaŭ oni vidis la malfacilecon de tio.

Tamen iu kies nomon mi bedaŭras ne scii, kredis kiel solvon diskuti temon pri arto aŭ scienco; tiam S^{ro}. Pujulà petis la parolon por rimarkigi ke politiko estas scienco, la scienco pri la regado; do — aldonis la alia — temo pri arto; kaj S^{no} G. Rebours de Pujulà proponis diskuti pri «Salomé» kiu estas ja pri arta temo kaj tamen oni tuj enirus en la moralo, religio kaj politiko. En tiu afero partoprenis krom la nomitaj, S^{roj}. Bacardit, Balcells, González, Vermúdez kaj aliaj kies nomojn bedaŭrinde mi ne rememoras.

La 25^{an} el la sama monato, nia klera samideanino, la bela edzino de S^{ro}. Pujulà, faris paroladon pri la francaj lernejoj, sed pro manko da spaco, mi ne povas ĝin raporti nun.

La prezidanto de la grupo de la «Ateneu Enciclopedic Popular», kiu organizis tiajn kunvenojn, kaj ankaŭ prezidante ĉiujn, S^{ro}. Antoni Barrot, bonvolis fari de nun, la taskon raporti la esperantistajn vendredojn, pro kio mi kore lin dankas, ĉar mi ne havas la necesan tempon por ĝin fari bone, kaj krom ĉi tio, li faros ĉi tiu raporton, pli bone ol mi — D. D.

TARRAGONA

Fine la entuziasmo per nia internacia lingvo vekiĝis en nia urbo, kaj nia vekiĝo ŝajnas elmontri de la efiko de K. E. F. kies organo estis ĝoje akceptita kaj reentuziasmigis nian samurbanon.

La ĉi tieaj oficialaj societoj kaj nia Urba Konsilantaro kaj Deputitaro sin montras tute favora al nia celo, kaj ni klopodas por ke antaŭ ne longe sia simpatio kaj favora akcepto por nia kaŭzo fariĝu reala.

Antaŭ unu monato la urbogardistoj komencis lerni Esperanton, kaj ĉiutage ili sentas pli da entuziasmo por Ĝi. Tio estas bona akiro, ĉar iamaniere la alilandaj esperantistoj povos antaŭ ne multe viziti nian historian urbon.

Okaze de la unua kongreso de katolikaj esperantistoj, la ĉi tiea Ĉefepiskopo sendis telegramon al la gekongresistoj.

La «Societia d'Atracció de Forasters» intencas publikigi gvidlibron de nia urbo, en kastila kaj esperanta lingvoj.

Multaj el niaj samideanoj ĉeestos en la 1.^a Kongreso de Katalunaj esperantistoj. — LA DELEGITO.

TERRASSA

Tiu ĉi grupo malfermis alian kurson por fraŭlinoj kiu estas farata de la fervora anino Gertrudis Cantarell kun laŭdinda lerteco.

Daŭrigas entuziasme en la montrita grupo la profitajn konferencojn kiujn mi raportis en la pasinta numero pri «Gramatikaj ĝeneralaĵoj», donataj de nia sperta gramatikisto S^{ro}. Quintín López helpata de la eminenta lingvisto D^r. Angel Sallent kaj la profesoro S^r. Johano Graells.

«Lumon» malfermis de antaŭ ne longe konton je sia kredito en la «Ĉekbanko Esperantista».

«Lumon» organizas esperantistan grupeton por infanoj kies inaŭguracia festo okazos la 1^{an} de Majo. Mi raportos detale tiun-ĉi rimarkindan feston en la venonta numero.

Impresigis la koron de la ĉi tiea esperantistaro la decidon okazigi la Unuan Katalunan Esperantistan Kongreson en la najbara urbo Sabadell. Terrassaanoj ni iru kune al la Kunveno! — LA DELEGITO.

SANTA PERPETUA DE LA MOGUDA

Eĉ en la plej malgrandaj vilaĝoj, nia bela lingvo havas entuziasmaj propagandistoj.

En tiu vilaĝeto oni fondis esperantan societon kiu sub la nomo «La Kamparo» batalos por nia afero.

Ni ricevis de ĝi koran saluton, por kiu ni restas tute dankemaj.

Nune estas *Prezidanto*, S^{ro}. Johano Soley, kaj *Sekretario*, S^{ro}. Mariano Angulo.

Antaŭen Ĉiam, samideanoj! Ni vin atendas tutkore ĉe ni.

IGUALADA

La ĉi tiea grupo «Igualada Esperantisto» ne plu loĝas en la Rambla Nova, n.^o 30. Ĝi havas nune sia sidejo ĉe «Ateneu Igualadí».

La komitato de tia grupo, estas la jena:

Prezidanto, S^{ro}. Justino Vilaró; *Sekretario*, S^{ro}. Jakobo Gomis; *Kasisto*, S^{ro}. Jozefo Rafegas; *Bibliotekisto*, S^{ro}. Johano Caballé; *Voĉdonantoj*, S^{roj}. J. Borràs, R. Gabarró, Ludoviko Ferrer; F^{inoj}. Katalino Vich kaj A. Cuadras.

Tiu ĉi grupo kune kun la grupo «Katolika Idealo», nomis delegiton de la K. E. F. al nia samideano Jakobo Gomis. Ni esperas ke la entuziasmo

kaj fervoro de nia delegito kaj la entrepreno de la du grupoj atingos plenan triumfon de Esperanto en tiu ĉi urbo kie antaŭ du jaroj Ĝi estis tiel kuraĝe propagandita. — LA DELEGITO.

VIC

La societo «Vika Esperantistaro» solenigis la 13.^{an} de Marto la inaguracian de sia nova socia loko, per literatura festo, kiu rezultis tre animoza, ĉeestante ankaŭ en ĝi tre simpatiaj sinjorinoj kaj ĉarmaj fraŭlinoj.

Post la malferma parolado de S^{ro}. Albiñana rimarkigante la nepran bezonon de l'Esperanto ĉe l' Homaro, aŭdigis sian agrablegan paroladon, S^{ino}. Sanvicens studente la disolvecon de Esperanto tra la civilizita mondo, kaj vere altiris la atenton de l' aŭdantoj.

S^{ro}. Pujadas rimarkigis per sia parolado «Vortoj» la bezonon altiri la laboristojn el la maldecaj lokoj, kiujn ili tiel ofte ĉeestas, ilin alportante al instruaj lokoj kiel esperantistaj societo k. c.

S^{ro}. Casals legis sian belan poemon «Miaj amoj» vere senta verko, de ĉiuj tre entuziasme aplaŭdita. Oni legis ankaŭ ĉarman poezion de F^{ino} Pratdesaba.

S^{ro}. Terricabras, rakontis belan historieton «La patra amo», kaj la lerta astronomiemulo S^{ro}. Pratdesaba, sciigis al ni sian lastan sonĝon «La Astronomio kaj Esperanto» rajdante sur vosto de kometo, kiu rezultis tre agrabla.

Fine ĉiuj ĉeestantoj starante kantis nian himnon «La Espero». — LA DELEGITO.

OLOT

Antaŭ nelonge «Olota Stelo» ricevis programon kaj regularon de la Gerona kongreseto, kiu okazos en la tagoj 14.^a kaj 15.^a de l'Aŭgusta monato projektita de la Gerona Esperantistaro. Ne estos necese diri ke ni ĝoje akceptis tiun projekton vidante nur en ĝi bonan propagandilon por nia provinco, ĉar ni supozas, ke ju pli oni laboras ia maniere aŭ alia, neniam forgesante la vorton «unuiĝo» despli kreskas nia bela afero. Sed bedaŭrinde mi suferis disreŭigon, vidante ke la tieaj organizintoj ne estas aliĝitaj al la nia amegata K. E. F. almenaŭ ĝis nun.

Bona esperantisto, laŭ mia opinio, devas aparteni almenaŭ al unu el la grupoj el la urbo kie loĝas, kiel bona urbano kaj esperantisto, sed ankaŭ estas tute necesege, esti aliĝitaj al la K. E. F. kiel bonaj katalunanoj.

La anoj de «Olota Stelo» havas la intencon trairi ĉiujn apudajn urbojn, por ilin esperantigi iom post iom; pro tio baldaŭ oni komencos la ekskursojn. — LA DELEGITO.

REUS

La esperanta movado ĝis nun estas fruktoplana en nia bela urbo, ĉar ni ĉiutage konigas al Reus'aj urbanoj, nian belan idealon, por kiu ili montras gravan fervoron.

Ĉiuj la lokaj gazetoj, estas aliĝintaj al ni, sed unu el ili kiu sin priokupas pli ol la aliaj por nia afero estas «Foment» ĉar ĝi publikis diversajn artikolojn pri nia bela lingvo.

La esperanta societo «Nova Semo» decidis sin aliĝi al la K. E. F. kaj ĝi ankaŭ havas la proponon organizi dum la venonta somero kelkajn ekskursojn al la najbaraj vilaĝoj, por propagandadi la Zamenhofan lingvon. — LA DELEGITO.

SABADELL

La ĉi-tiea grupo «Esperanta Semo» dum la pasinta monato, translokiĝis sian sidejon en la domon kiun de longe loĝas la kultura societo «Ateneo» — Placo de Pi y Margall, 10 kaj 11 — kies dua etaĝo estas nun parte okupata de tiu. La centreco de la loko rilate al la urba situacio kaj ĝiaj bonaj kondiĉoj, same pro la vasteco de la domo kiel pro la majesteco de la ties facado, aŭguras al la malnova esperantista societo estonton plej belan tial, ke la geurbanaro estos pli altirata de ĝi por ĉeesti kaj viziti ĝiajn kursojn kaj festaktojn venontajn, kaj ĉiuj samideanoj enurbaj kaj eksterurbaj povos trovi en la grupejo la komforton necesan kiu kun la gastamo posedata de la propra gaja geanaro, faros agrabla kaj amuza la tempon de ilia ĉeestado.

Ankaŭ la vasta societo «Aplec» Esperanta Grupo daŭras en la sukceso. Dum la lasta monato, ĝi malfermis esperantan kurson por virinoj kies klasoj sin sekvas plej esperige, pro kio meritas ĉies gratulojn sen distingo instruanto kaj lernantinoj.

En la lasta Aprila remajno eknalfermis kurson por katolikoj la «Esperanta Fako» de la «Academia Católica».

La ekscio pri okazo en nia urbo de la unua kongreso kiun alvokis la K. E. F., vekis entuziasmojn en ĉiu esperantista koro. La sabadell'anoj atendas ĝoje tiun okazon por esprimi sian afekcion al ĉiuj enlandaj gebatalantoj.



OFICIALA PARTO

Conforme anunciavem en el primer número de KATALUNO ESPERANTISTO, i tal com prevenen els estatuts, el Primer Congrés d'Esperantistes Catalans ha de celebrar-se els dies 15 i 16 de Maig, havent decidit el Consell Directiu (provisional) que dit Congrés tingui lloc a Sabadell.

El referit Congrés s'efectuarà segons l'adjunt ordre:

Dia 15 de Maig (diumenge):

Al matí. — Recepció a Cà la Ciutat, al «Gremi de Fabricants», a l'«Escola d'Arts i Oficis», i al «Centre de Dependents».

A les tres de la tarda. — Primera sessió (oficial), d'acord amb la següent ordre del dia:

Memoria raport dels treballs de constitució de la «K. E. F.» pel senyor Joan B. Albiñana, *secretari*.

Presentació i explicació de les finances, pel Sr. Joan Piferrer, *caixer-administrador*.

Donar compte dels delegats elegits en cada població.

Elecció de càrrecs del Comitè Directiu que ha de regir la «K. E. F.» en el curs de 1910 a 1911.

Designació de la localitat ont haurà de celebrar-se'l vinent Congrés.

A dos quarts de deu de la nit. — Vetllada organitzada pels esperantistes sabadellencs en honor dels senyors Congressistes, la qual tindrà lloc en els salons de l'«Ateneu», prenent-hi part distingits esperantistes.

Dia 16 de Maig (dilluns):

A les deu del matí.—Segona sessió. Discussió dels temes presentats, baix aquest ordre:

Tema primer. — «¿Es convenient, per al millor desenrotllament de la «K. E. F.», la designació de més d'un delegat en cada localitat?» — *Ponent*: Josep Palmerola, de Vic.

Tema segon. — «Per als *samideanoj* que viuen lluny, isolats dels centres ont hi han agrupaments, es necessari que'l Congrés acordi l'institució d'un Comitè per a que solventi i aclareixi els dubtes i incomprendions que s'ocorren a dits companys, a fi de que puguin lograr posseir l'Esperanto al menys amb relativa perfecció». — *Ponent*: J. Ximinis Guri, de L'Escala (Girona).

Tema tercer. — «Necessitat de fer propaganda constant i assídua en els periodics i diaris locals, principalment en els de Barcelona, per ser els de més circulació.» — *Ponent*: Antoni Martí, de Sabadell.

Tema quart. — «Que'l Congrés acordi la creació de *Maristan Komision*, que residirà a Barcelona, l'objecte de la qual serà la propaganda de l'Esperanto, per les claus *Ĉefeĉ*, entre els marins dels vaixells estrangers que visitin el port de Barcelona.» — *Ponent*: F. Pujulà i Vallés, de Barcelona.

Tema quint. — «Amb el proposit d'estimular als esperantistes, seria util organitzar concursos literaris de treballs en Esperanto (originals o traduïts), concedint recompenses als que sortissin premiats. Projecte i manera de portar-ho a terme.» — *Ponent*: Domenec Serdà, de Sabadell.

Tema sext. — «Utilitat d'introduir l'Esperanto en les institucions oficials, creant en aquest sentit, dintre de la «K. E. F.», seccions especials. — *Ponent*: Grupu «Lumon», de Terrassa.

Aquests són els temes presentats fins al dia 28, lo qual demostra que hi ha vertader interès en fer alguna cosa pràctica, com així ho espera'l Consell Directiu.

El Consell Directiu ha cregut oportú la celebració d'un *Banquet de germanor*, el qual tindrà lloc el dia 15 (diumenge), a les vuit en punt de la nit, a l'esplendí saló de l'Hotel de Espanya. El preu del cobert es de

quatre pessetes, havent d'enviar el llur nom al domicili de la «K. E. F.» tots els esperantistes que vulguin assistir-hi.

Durant l'últim mes han engruixit nostres rengles, esperantistes de L'Escala, Berga i Igualada, en les quals poblacions regna fort entusiasme per la nostra «K. E. F.» així com també s'han adherit els agrupaments «Espero Kataluna», «Esperanto Juneco», «Olota Stelo», «La Kvinpinta Stelo» i «Nova Semo», lo qual demostra una volta més la bondat de la nostra institució.

Se prega a tots els que tinguin intenció de quedar-se a Sabadell durant els dies 15 i 16, que a la major brevitat, ne donin coneixement, per postal, an aquesta Redacció (si volen que se'ls procuri allotjament) fins al dia 12 d'aquest mes.

Gracies a les gestions fetes pels nostres companys de Sabadell a l'Ajuntament de dita ciutat, «K. E. F.» tindrà a sa disposició 'l magnific saló de sessions de dita corporació, com també possiblement una subvenció metàlica; lo qual, sens dubte, serà acordat en una de les proximes sessions de dit Ajuntament, fent patent això l'entusiasme que sent per la nostra idea.

El Consell Directiu (provisional) dóna mil mercès a tots els senyors que han tingut la bondat de dirigir-li paraules d'encoratjament, ja per cartes rebudes en aquesta redacció, o desde altres periodics, ja que això ha demostrat a dit Consell que no's troba sol a la lluita, i que té qui'l segueix per a apoiar-lo si ho fa bé, o advertir-lo si s'equivoca.

Tots els senyors esperantistes que vulguin arribar a Sabadell a hora oportuna per a assistir a les recepcions de l'Ajuntament, «Gremi de Fabricants», «Escola d'Arts i Oficis», i «Centre de Dependents», poden sortir de Barcelona (estació del Nord) en els trens de les 8'23 i 9'30 del matí, i han de baixar al parador de la Rambla on ja hi haurà una nombrosa comissió d'esperantistes sabadellencs per a donar-los la benvinguda.



KORESPONDADO

Al niaj afablaj gekunlaborantoj ni devas insiste peti, ke ili sendu siajn manuskriptojn, *legeble skribitajn, nur sur unu flanko de la papero*. Plie, kvankam ni laŭ bezone korektos la alsenditajn skribaĵojn, ni unike korektos tiujn, kiuj ne entenos multajn erarojn, tiamaniere ke, por ilin enpresigi en nia gazeto, ni ne estos devigataj ilin verki novan fojon.

Fino T. P., S-roj J. Pratdesaba, J. M.^a T., J. P., A. B. kaj J. B. M.: Viajn alsenditajn verkojn estos baldaŭ publikigitaj.